# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 13/05/2021 Kvincenttrideka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


## Entute 812,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **281,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **234,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **210,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **86,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).




N.ro 34 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En frazo povas esti multaj aŭ malmultaj adjektoj. Ĉu ĉiu el ili havas sian propran kernvorton?
2). La predikato ĉiam enhavas verbon. Kiojn aliajn la predikato povas enhavi?
3). Kiu vortspeco povas esti la kernvorto de adjekto?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 530.

*Marcel Leereveld*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



## _La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon. http://esperantaretradio.blogspot.com.



## Forgesu la facilecon!

En la propagando por Esperanto ĝia laŭdira facileco estas grava kriterio por konvinki homojn pri avantaĝo en la lernado de la lingvo. Tiu argumento tamen estas misgvida. Esperanto ja estas bone strukturita lingvo kaj tial lernanto povas sufiĉe rapide ekkoni ĝian strukturon. Tamen tio ne nepre estas facila, ĉar necesas por tio ankaŭ sufiĉe forta mensa kapablo. Oni ne kvazaŭ senpense povas lerni Esperanton, tute male: Necesas kompreni la funkciojn de ĝiaj elementoj por povi elekti en la parolado la plej taŭgajn por esprimi sin en konkreta kazo. KTP, KTP. Esperanta Retradio 8a majo Legu/Aŭskulu la tutan artikolon Esperanta Retradio

## Surhavu vizaĝmaskon.

**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.






## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 21a de majo estos la tria sabato. Venu!! *Roger Springer*

## Nia alianco kun Usono

Mi malkonsentas ke la nura kialo por ataki Aŭstralion estas nur nia alianco kun Usono. Aŭstralio estas minaĵoriĉa lando, kiun Ĉinio klopodas aĉeti de multaj jaroj. Ili nun baze posedas profundan akvan havenon en Darwin kaj flughavenon en WA, kiu estis pligrandigita por akcepti militajn aviadilojn. Ili ankaŭ konstruas en PNG, malpli ol tridek kilometrojn de Aŭstraliaj instalaĵoj, kiuj donus al ili bazon de kie ataki Nordan Aŭstralion. Ilia agresema sinteno al aliaj aziaj landoj estas evidenta. Iru al Vjetnamujo, Kamboĝo ktp por vidi kiel ili transprenas la landojn. La samo en Afriko. Ĉinio estas la plej granda minaco al Aŭstralio de kiam Japanio invadis PNG en WW2. Ni ankaŭ havas multajn malplenajn spacojn, kiujn ili feliĉe plenigus. Simile al la deziro de Hitler pligrandigi la landlimojn de Germanio. *Gordon Coleman*

**Vjetnamujo, Kamboĝo,** ktp, estis detruita per milito kiam oni provis halti komunismon. Mi preferas havi la pacon kiun ni nun havas kaj ne militon por liberigi min. En la epoko de misiloj, milito ne plu estas kisi la junulojn kaj sendi ilin al fora lando por mortigi aliulojn dum mi restas sekura ĉe hejmo *RS*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



# Pri la kapitalismo .

## LA EVOLUO DE LA KAPITALISMO.

La kapitalismo ne estas de la homo intence kreita kaj daŭrigata: ĝi evoluis kaj evoluas nature ĉar la homo, por pluvivi sammaniere, devas partopreni en posedokonkurado kun aliaj homoj, ĉu li volas aŭ ne. Li ne povas agi alie. Li ne povas elekti alie, ĉar li perdus posedaĵojn, kaj do malriĉiĝus. Elekto ne ludas parton en tio. Li malpliriĉiĝas, kaj eĉ malriĉiĝas, se la aliaj homoj pliriĉiĝas. La homoj ne povas krei ekonomion, en kiu ĉies riĉo restas sama. Nur sanga revolucio povus ŝanĝi tion. Kaj la nenecese dezirata socio jam kreis situacion kun tiom riĉa superklaso, ke renverso ne plu eblas, almenaŭ ne sen eksterkapitalismaj fortoj. En la unua jarcento de la kapitalismo ekzistis ankoraŭ ŝanco, kun la helpo de nekapitalismaj fortoj kaj ŝtato, renversi la kapitalismon, kaj krei ion alian, bonan aŭ malbonan. Sed la plej potencaj kapitalismaj societoj nature fariĝis ege potencaj. Se tio ne estus okazinta, aliaj societoj estus nature transprenantaj la potencon. Por reteni sian ekonomian kaj socian potencon, la gvidantaj kompanioj devis suben puŝi la konkurancojn. La kompanioj devis forte studi kiel venki. Ili tiom studis, ke nenio povas nun supervenki. Pro tio la homoj en la libera, uson-eŭropa kapitalismo povas nun nur peni konvinki la regantan klikon pli afable trakti la homojn, kaj por reteni pli agrablan atmosferon tio ofte okazas.

Sed ekzistas en la mondo iom malsama kapitalismo, en kiu ne la fortaj kompanioj regas, sed la ŝtato. Ĝi nomiĝas ŝtatkapitalismo, kaj antaŭe regis en Rusujo. Nun ni trovas ĝin precipe en Ĉinujo. Ĝi estas konkurenco al la okcidenta kapitalismo, kaj nature devas fariĝi pli potenca ol la aliaj, por pluvivi. La ordinaraj homoj povas fari nenion pri tiu konkurencado, kaj devas esperi ne esti parto de tiu milito, kiu certe venos. La mortigaj armiloj jam pretas.

*Marcel Leereveld.*

## LA BONAĴOJ DE LA KAPITALISMO.

Ni scias la malbonaĵojn de la kapitalisma sistemo: La dividon de la homoj en diversajn sociajn klasojn, la militojn, la oftan mizeron de la malsupera klaso, kaj la malliberecon. Pro tio multaj homoj ŝatus vivi en senklasa socio. Sed kie ajn ĝi komencis, la gvidantaj kompanioj de la kapitalista klaso zorgis, milite, ke tia egaleco detruatu. Ankaŭ la ŝtatkapitalismo ne povas toleri tiun egalecon, kiel ni vidas en okcidenta Ĉinujo. Menciindas ankaŭ la grandega perdo de produktoj pro la forĵeto de grandegaj kvantoj da uzeblaĵoj. Sed malgraŭ tiuj kapitalismaj negativaĵoj, ni povas trovi ankaŭ tre bone pozitivajn flankojn de la kapitalismo. Precipe en la militoj la kuracistoj devas lerni kaj praktiki pli sukcesajn kuracmetodojn, kaj la medicinaj sciencistoj povas multe eksperimenti sur la vunditaj soldatoj kaj tiel trovi novajn kuracmetodojn, precipe operaciojn. La dua mondmilito ankaŭ kaŭzis, ke ni ne bezonas vivi sub Hitler kaj la nazioj. Multaj bonaj produktmetodoj inventatis pli frue en la nuna ekonomia sistemo ol en aliaj. La konkurencado ofte kreas pli agrablajn vivkondiĉojn por multaj homoj, speciale en la mezaj klasoj. Kaj la por niaj vivoj tre intensa teĥnika evoluo de la socia interkomunikadsistemo estus aperinta multe pli poste ol nun. Tiu teĥnika evoluego afektas ĉiujn homojn, kaj okazas ankaŭ en la ĉina kaj aliaj ŝtatkapitalismoj. Kaj ĉiuj tiuj avantaĝoj transprenatos de pli humana socia sistemo, kiam ĝi iam aperos. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***




# La nova ĝisdatita rubriko de Brisbano.

## Kial kontraŭ kronvirusa vakcino estas patentita?
## Ĉu oni elektas profiton kaj ne multmilojn da vivoj?

La ekonomia sistemo valorigas monon pli ol homaj vivoj. Ĉu vi konsentas? [Fino de citaĵo.]

Dum kelkaj jaroj, mi laboris pri sendanĝereco en aŭtomobiloj. Ĉirkaŭ 1960~1970, iu kompanio fabrikis "seĝzonojn" por aŭtomobiloj, kaj patentigis ĝian dezajnon. Iuj personoj kritikis tiun kompanion pro tio, sed iu proparolanto, por la kompanio, klarigis ke kostis multe da mono evoluigi bonan seĝzonon. Dum mi laboris por General Motors-Holden, mi provis ĉirkaŭ 2,000 seĝzonojn, kaj mi povas diri ke kelkaj fruaj seĝzonoj ne estis tre bonaj! La aparato, kun kiu mi provis la seĝzonojn, kostis ĉirkaŭ $1,000,000 en 1960. Jes; ekzistis pli malkaraj aparatoj kaj mi estas vidinta la rezultojn de iliaj provoj; mi ne vetus mian vivon je la akureco de tiuj rezultoj!

La vakcino devas esti tute sendanĝera kaj tiu ne estas malkara. Ĉu vi vetus vian vivon je malkara vakcino?

"Malkara ne estas bona, kaj bona ne estas malkara."

Akiru vian vakcinon kaj surmetu vian seĝzonon! Via vivo dependas de tio! *Ken Rolls*



**3ZZZ** … Krom rimarkoj pri la efiko de karesoj kaj masaĝoj, la temo de la elsendo de la 10a de majo 2021 estas la lingvo Esperanto kun anonco pri nova vortaro kaj recenzo de romano verkita de Mikaelo Bronstejn ….*Franciska Toubale*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO 34**



1). Jes.
2). Infinitivon (ĉe moda helpverbo), aŭ predikativon.
3). Prepozicio (ĉe prepozitivo), aŭ adverbo.

*Marcel Leereveld.*

Se oni prokrastas ĝis perfekteco, oni faras nenion, ĉar la morto atendas nin.

Skribu al ni. rspring@tpg.com.au *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***